9-a JARO, N-o 404 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25.4.1933

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO : 14, av. de Corbéra, Paris 12e. — GVIDANTO : E. Lanti. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO.
ADMINISTREJO : 23, rue Boyer, Paris 20e.

EPILOGE.

Fine ni trafis la celon....

Estis jam malfrue en la nokto, k mi pretiĝis enlitiĝi, kiam oni insiste sonorigis ĉe la sojlo de mia loĝejo. Malferminte la pordon, kun granda miro mi ekvidis la bolŝevikan esperantiston Fermal k la menŝevikan Maraŝ. Kion, diablo! volas tiuj entruduloj mi pensis? Sur la vizaĝo de la du neatenditaj k nedezirataj vizitantoj radiis esprimo de kontento k de entuziasmo, k tuj ekparolis Fermal :

— Pardonu, K-do Lanti, sed ni estas certaj, ke vi ne riproĉos al ni, kiam vi ekkonos la celon de nia vizito. Ni alportas al vi tiom eksterordinare gravan novaĵon, ke vi eĉ dankos al ni pro tio, ke ni ne volis eĉ unu solan horon prokrasti ĝian konigon al vi....

Invitinte la du gajmienulojn, ke ili eniru mian ĉambron, mi diris komplezeme :

— Nu, bonvolu sidiĝi; mia aŭdorgano estas streĉegita por aŭskulti vian raporton....

Tiam per iom knaranta voĉo Maraŝ ekparolis :

— Kiel vi certe scias, antaŭ kelkaj monatoj la supera instanco de la II-a Internacio sin turnis al tiu de la III-a kun propono pri aranĝo de unuecfronta agado kontraŭ la faŝismon. Unue venis el Moskvo ne tre favora respondo, sed post kelkaj personaj intertraktoj de la gvidantoj finfine estas nun atingita plena interkonsento, kiu esperigas post kelka tempo ne nur unuecfrontan agadon, sed eĉ rekuniĝon de la disigitaj fortoj en unu saman organizon. Tial ke mi k Fermal havas sufiĉe intiman kontakton kun la gvidantoj de niaj respektivaj partioj, ni povis esti jam informitaj pri la okazaĵo, pri kiu ĉiuj komunistaj k socialistaj gazetoj morgaŭ larĝe raportos....

— Ni tamen ne venus ĝeni vin nur por sciigi tion, se en la interkonsento farita ne estus ankaŭ tre grava decido pri esperanto, intermetis Fermal.

— Kompreneble, akcentis Maraŝ, prezentante al mi paperfolion kun peto, ke mi bonvolu mem konatiĝi per propraj okuloj kun la eksterordinare grava teksto, kiu fakte signifas la definitivan venkon de esperanto en la laboristaj rondoj.

Preninte en la manojn la folion, kun streĉa atento k granda surprizo mi legis jenon :

« ... Kiel plia signo, ke la interkonsento farita inter ambaŭ organizoj (II-a k III-a Internacioj) signifas radikalan ŝanĝon en ilia ĝisnuna politiko k taktiko, estas decidite fari ĉiujn necesajn aranĝojn, por ke la internacia lingvo esperanto fariĝu kiom eble plej baldaŭ la oficiala lingvo por ĉiuj internaciaj rilatoj. Tiu decido estas motivigita per la sekvaj konsideroj :

« 1) La finfina emancipiĝo de l' proletaro povas okazi nur mondskale; konsekvence necesas, ke la laboristoj el ĉiuj landoj estu pli k pli intime interligitaj k sentu sin solidaraj. 2) Bedaŭrinde la malsamlingveco tre malhelpas, ke la simplaj laboristoj sentu k spertu solidaron. 3) Tia stato plie estas unu el la kaŭzoj de la facilo, laŭ kiu demagogoj kiel Musolini k Hitler povas utiligi la naciemon de la popolamasoj por trompi k sklavigi ilin. 4) La naciismo ja estas unu el la plej intensaj k danĝeraj ideofortoj k pasioj, kiuj impulsas la homojn; sekve ĉiu taŭga rimedo por kontraŭbatali la naciemon devas esti aplikata k esperanto nekontraŭdireble estas unu el tiaj rimedoj.

« Por efektivigi tiun nian decidon, jenaj praktikaj aranĝoj estu senprokraste farataj : *a*) Entrepreni en la gazetaro viglan k daŭran propagandon por esperanto; *b*) ektrakti kun la laboristaj esperantaj organizoj, por ke ties membroj helpu nin en la efektivigo de nia decido; *c*) rekruti ĉiujn spertajn k sufiĉe klerajn esperantistojn por komisii al ili la tradukadon en esperanton de ĉiuj gravaj verkoj k dokumentoj necesaj por la klerigado k informado de la tutmonda laboristaro; *d*) aperigi komence monatan k iom poste dusemajnan gravan revuon en esperanto; *e*) postuli, ke post unu jaro neniu nova funkciulo aŭ oficisto povos esti akceptata, se li ne scipovas esperanton; *f*) en la landoj, kie la regado jam estas en la manoj de reprezentantoj de l' proletaro, tie esperanto estu devige instruata en la lernejoj.... »

Mi apenaŭ povis kredi je miaj okuloj k suspekteme rigardis al Maraŝ k Fermal : « ĉu tio ne estas mistifiko », mi pensis. Sendube Fermal vidis mian suspekton k li eldiris :

— Ni komprenas vian miregon, K-do Lanti, sed tiu teksto estas tute aŭtentika k morgaŭ vi povos legi ĝin en la partiaj gazetoj. Cetere por montri al vi, kiagrade aliiĝis la spiritostato de la gvidantoj, eksciu, ke jam Trocki estas survoje al Moskvo, kie de nun li kunlaboros bonkamarade kun Stalin. Simile okazas en Sovetio rilate al malliberigitaj anarkistoj k menŝevikoj.

Aliparte en la 30-paĝa raporto el kiu ni kopiis la tekston, kiun vi ĵus legis, estas deklaroj tre signifoplenaj pri la nova sinteno de la komunistaj k socialistaj gvidantoj. Ambaŭ konfesas tute malkaŝe k sincere, ke ili faris en la pasinto multajn erarojn k ne taksis je ĝusta valoro plurajn faktorojn, kiuj tamen ludas grandan rolon en la evoluo de l' socioj. La kreskanta minaco de l' faŝismo finfine saĝigis niajn gvidantojn k tial ili decidis ĉesigi la fratbatalon....

. . . .

Mi frotis al mi la okulojn k mirigite konstatis, ke estas tute mallume en mia ĉambro. Kio do okazis? Ĉu mi sonĝis? Kie estas Fermal k Maraŝ? Malaperintaj!...

Ne povas esti dubo : mi faris belan, tre belan sonĝon....

E. L.

Je la nomo de SAT, 23, rue Boyer, Paris 20, jam ekfunkciis jenaj novaj poŝtĉekaj kontoj :

Bruxelles n-ro 350 189
Leipzig n-ro 85 148
Wien n-ro 109 068

Ĉe la Stokholmaj kooperistoj.

La unua provo krei sennaciecan produkt-entreprenon kooperativan.

En la ĥaosa stato nuntempa estas ĝojige rimarki, kiel la kooperativaj organizoj malgraŭ la krizo kreskas k fortiĝas. Ili ja vere estas la estontatempa helpilo por akiro de pli bonaj cirkonstancoj, kontrolante la prezojn de la ĉiutagaj necesajoj, tiel kreante pli grandan ekvilibron inter en- k elspezoj, precipe por laboristoj.

En Svedio la kooperativa movado estiĝis tre forta k nun eĉ sufiĉe bone kontrolas la privatkapitalistajn entreprenojn. Se iu el tiuj lastaj atribuas al si tro grandan profiton, la kooperativa centro minacas ĝin per memproduktado de koncernaj varoj. Tiele la kooperativa centro frakasis enlandajn trustojn de margarino, faruno k kaŭĉuko, mem starigante fabrikojn por tiuj varoj, kio kaŭzis prezmalaltiĝon ĝis 50 procentoj.

La batalo kontraŭ la privataj entreprenoj komenciĝis kontraŭ la margarina trusto, kiu estis—k daŭre estas — kontrolata de grandaj eksterlandaj firmoj. Dum kelkaj jaroj tiu batalo daŭris, kiu tamen finiĝis per tio, ke la kooperativo restis venkinto. Same kun la muelila trusto, kies prezoj rilate al la produktokostoj estis tro altaj. Ĉar en tiu tempo jam sufiĉe multaj mueliloj troviĝis por la bezono de la sveda popolo k la trusto posedis ĉiujn, ili devis forlasi du el siaj mueliloj al la malamiko « Kooperativa centro », aliel la kooperativo mem estus konstruinta novajn. La kooperativo tuj post la akiro de la mueliloj modernigis ilin k poste la eblo por la trusto mem difini prezon malekzistis. Rilate al la kaŭĉuka trusto estis tiel, ke la agentoj k vendistoj atribuis al si sufiĉe altan profiton, kiun devis pagi la konsumantoj. La kooperativo unue iom ĝentile admonis la truston malaltigi la prezojn por galoŝoj — en Svedio tre multe uzata artiklo — al kio estis respondata per moko k neo. La kooperativo do decidis mem konstrui fabrikon por tiaj varoj. Rezulto — malaltigo tuja per po 2. — kr. por paro da galoŝoj, k kiam la fabriko estis preta, nova malaltigo okazis, k nune la galoŝoprezo estas sufiĉe malalta. La trusto nun tute ne havas forton plue evolui, sed devas submetiĝi kiel la margarina k muelila trustoj pli frue devis fari, sekvante la « prezpolitikon » de l' kooperativo, ki uestas sufiĉe prudenta.

La elektraj lampoj.

Dum multaj jaroj la svedaj elektrolampaj fabrikoj estis kontrolataj de la potenca Osram- k Filiptrusto. La prezo de simpla elektra malforta lampo estis 1,35 kr. Laŭ esploroj de l' kooperativo oni konstatis, ke eblus produkti tiajn lampotipojn por prezo de 0,85 kr. k tamen la spezara ekvilibro estus. Tiun fakton la kooperativo konigis al la ĉefoj de la koncerna trustego. Ili tamen nur skuis la kapon, rifuzante fari eĉ etan plimalkarigon de la prezoj. Samtempe la trusto provis k ankaŭ sukcesis akiri ĉiujn pli signifajn fabrikojn por lampoj, sekve ĝi regis la tutan svedan



La munta ĉambrego de l' LUMA-kooperativo.

merkaton. Sed ili forgesis pri la forto de la kooperativo. Tiu nun decidis mem konstrui lampofabrikon, laŭ tute moderna stilo k instalo. La fundamenton por tiu konstruo oni faris en la jaro 1929 k la fabrikado komenciĝis fine de la jaro 1930. Komence la fabriko ne povis produkti lampojn en sufiĉa kvanto por ĉiuj mendantoj, sed jam post duonjaro ĝia produktokapablo estis tage po 25 000 lampoj. La trusto, kiu post la nura decido pri kooperativa fabriko povis vendi siajn lampojn por prezo de 1,25 kr., iom post iom plimalkarigis la prezon ĝis la sama, kiun la kooperativo jam decidinte starigi fabrikon proponis, nome 0,85 kr., k kiu estas la prezo de la kooperativa lampo.

Sennacieca tendenco de la entrepreno.

Jam dum la kongreso de la kooperativa alianco — la mondorganizo de la kooperistoj — 1927 en Stokholmo, oni diskutis la evoluon de la kooperativaj entreprenoj k la svedaj kooperistoj forte substrekis la deziron pri kiel eble plej intima sennacieca kunlaboro por la venko de la kooperativa ideo.

Pli frue ol oni povis imagi al si, la kooperativa centro sveda havis okazon realigi siajn dirojn k dezirojn. Per la kreo de la lampofabriko, kies produktado ja havas internacian merkaton, oni do tuj ekkomencis la provon, kiu montriĝis bona. La 28-an de majo 1931 kunsidis en Kopenhago (Danio) reprezentantoj por la kvar skandinavaj centroj : dana, norvega, finlanda k sveda kun la intenco starigi sennaciecan organizon por elektraj lampoj. La ĉefo de la sveda kooperativo, K-do Albin Johanson faris paroladon, kiu kaŭzis diskuton k post ĝi oni fondis Luma-asocion, kies tasko laŭ la unua paragrafo de la en la sama kunveno akceptita statuto estas ; « Akceli la ekonomiajn interesojn de la anoj, fabrikante aŭ havigante al ili varojn, speciale elektrajn lampojn ». En la paragrafo 4-a de la sama statuto tekstas : « Anoj povas esti kooperativaj centroorganizoj aŭ paralelaj organizoj », jen do fundamento por tutmonda organizo.

La organoj de la asocio estas : 1) la asocia kunveno; 2) la administra konsilantaro; 3) la estraro; 4) la reviziantoj.

Po unu el la aliĝintaj kooperativaj landorganizoj estas ano de la administra konsilantaro, kiu siavice havas kiel taskon elekti la estraron de la asocio. Por plenumi sian taskon, la administra konsilantaro rajtas senliman kontrolon pri la librotenado k aktoj, krome havas rajton partopreni diversajn kontrolagojn.

El la superresto, kiu eventuale estiĝas per la agado k superas la rentumon da 5 procentoj je la kapitalo enmetita, almenaŭ 10 procentoj estu fondantaj rezervan fondaĵon. Post tiu rezervigo la plia restaĵo dividiĝas laŭ la vendoj de la anoj. Tamen oni povas pagi tiun restaĵon nur, se ĉiuj interkonsentis pri tio.

La statuto do estas, kiel oni povas konstati, tute demokrata.

La fabriko situas sur la bordo de la Hammarbi-kanalo de Stokholmo. Sekve la kongreskomitato provis enprogramigi viziton al tiu tute novtempa entrepreno, k mi povas ĝojigi la partoprenontojn per la sciigo, ke ni sukcesis. La kongresanoj do havos eblon vidi, kiel funkcias sennacieca entrepreno kooperativa, ĉar la fabrika ĉefo eĉ promesis al la komitato meti esperantotekstajn klarigojn ĉe la diversaj maŝinoj en la fabriko.

Kiel mi ĉi-supre menciis, la fabrikon nun posedas la dana, finlanda, norvega k sveda kooperativaj centroj. Sekve oni devas reklami la lampojn per la kvar lingvoj. Ankoraŭ la kooperativaj estroj ne estas konvinkitaj pri la neceso k uzeblo de esperanto, sed ĉar ili estas moderne pensantaj homoj, verŝajne la tempo ne estos tre malproksima, kiam ili konsideros nian lingvon uzenda.

La kooperativa lampo Luma jam komencis sian venkomarŝon kontraŭ la monopolfirmoj Osram k Filip, k evidente la tempo baldaŭ venos, kiam la kooperativa lampofabrikado evoluos tiom, ke ĝi eĉ estos pli potenca ol la nunaj potenculoj. Tiuj ja sufiĉe longan tempon forrabis monon de la konsumantoj per la tro altaj prezoj por elektraj lampoj.

Gek-doj! Venu al Stokholmo por mem rigardi, kiel laboras la sveda kooperativa movado. Eble ĝi havas ion por instrui al vi.

Joĉjo.

XIII-a Kongreso de SAT en Stokholmo

(5-a—10-a de aŭg. 1933).



Kvara komuniko.

Kongresa reklammarko. OKK entreprenis la eldonon de speciala glumarko por leteroj k aliaj sendaĵoj. La glumarko montras la silueton de Urba domo k sindikatfederacia domo (vd. kliŝon). Kartoj kun 20 glumarkoj kostas unu respondkuponon.

Ŝanĝo de mono. En la sama domo, kie SLEA havas sian oficejon, apud la kongresejo, estas banka filio, kiu prizorgos la monaferojn de la kongresanoj. En tiu oficejo dum la kongrestagoj deĵoros lingvokapabla oficisto. La nomo de la banko estas : *Södermanlands Enskilda Bank filial G.*

Poŝtoficejo. En la granda halo de Domo de l' popolo, kie estos la kongresa akceptejo, ankaŭ dum la kongreso estos poŝtoficejo, en kiu deĵoros esperantisto. La direktoro ankaŭ liveros specialan stampilon por la kongreso.

La kongreskotizo. Ĉar alvenis aliĝiloj, kiuj ne indikas la starigitan sumon, OKK substrekas, ke la valoro devas esti 3 svedaj kronoj por SAT-anoj k 5 svedaj kronoj por ne-SAT-anoj. Aliajn aliĝilojn ni ne povas konsideri.

Ĉu eblos iom malkarigi la vojaĝoprezojn aŭ ne, OKK ankoraŭ ne finesploris. Pri tio k pri la loĝeja afero ni eble povos venontmonate doni precizan komunikon. Tamen jam nun estas certe, ke estos eble havigi loĝejojn por 1,25 sv. krono tage. La tendara afero estas solvota k certa sciigo aperos en la 5- a komuniko. *OKK.*

2-a listo de aliĝintoj.

13.	Ernst Eriksson	Stokholmo	(Svedio).
14.	John Johansson	—	—
15.	Axel Norrman	—	—
16.	Nils Olofsson	—	—
17.	Hj. Olsson	—	—
18.	A. V. Lundqvist	—	—
19.	Oscar Dahrnè	Västerås	—
20.	Halvard Mildh	Stokh.	—
21.	K. Deubler	München	(Germ.).
22.	J. Feibacher	S. Pölten	(Aŭstrio).
23.	J. Farrand	Manchester	(Anglio).
24.	K-dino Ena Farrand	—	—
25.	— Ivar Mattsson	Stokh.	(Svedio).
26.	— A. Eijkenaar	Apeldoorn	(Holando).
27.	— Rud. Svensson	Stokh.	(Svedio).
28.	K-dino Mallan Svensson	—	—
29.	— Gunnar Rosell	—	—
30.	— Gustav Persson	—	—
31.	— Folke Rosèn	—	—
32.	— Ludw. Puff.	Frankfurt-M.	(Germ.).
33.	K-dino E. Hoffmann	—	—
34.	— J. vant Hof	Amsterdam	(Holando).
35.	— H. Vagner	Stuttgart	(Germ.).
36.	— Osk. Wettig	Gelnhausen	—
37.	— Alf. Andersson	Stokh.	(Svedio).
38.	— Agda Andersson	—	—
39.	— Selma Jansson	—	—
40.	— Tor Solander	—	—
41.	K-dino Suz. Galo	Les Lilas	(Francio).
42.	— Alb. Ozre	—	—
43.	— Fr. Paquier	Paris	—
44.	— Karl Österholm	Malmö	—
45.	— Ernst Georgi	Merkstein	(Germ.).
46.	K-dino H. A. Buis	Bussum	(Nederl.).
47.	K-dino V. d. Heide	—	—

La altlernejo laborista ĉe la Stokholma kongreso.

La plano pri la kongresa altlernejo laborista estas akceptita kun granda fervoro de multaj K-doj. Maldetale k nedefinitive mi jam nun povas skizi kelkajn punktojn el la programo de la kurso.

Gimnastiko. Ĉiutage — verŝajne ĉiumatene — okazos gimnastikaj lecionoj, unu speciale aranĝita por K-dinoj k unu speciale por K-doj. Praktika aranĝo de movadĥora eduko estos enmetata en tiuj lecionoj.

Lekcioj. Sin anoncis kelkaj spertaj K-doj (tamen ankoraŭ nesufiĉe multaj), k la temoj estos grandaparte ŝtatekonomiaj. Ni mencias kelkajn el la verŝajne lekciotaj temoj, kiuj estos pritraktataj el klasbatala vidpunkto : « Socialista merkata ekonomio », « Monopoloj », kelkaj lekcioj pri genetiko (hereda scienco) k ĝia apliko (i. a. speciala lekcio pri ĝia apliko por plibonigi herede la homajn rasojn per la t. n. rashigieno, « eŭgeniko », k pri la nacisocialista apliko de tiu scienco), « Proleta festkulturo » pri racie klaskonscia aranĝo de proletaj festoj (ili ne restu — kiel ofte — burĝece infektitaj, sed ili estu rekte klasbatale direktitaj).

Ni ripetas niajn alvokojn en n-roj 399 (29/12 1932) k 400 (12/1 1933) pri aktiva k pozitiva intereso : ke venu proponoj k konsiloj pri aranĝo, pri personoj kapablaj por lekciado, ke sin anoncu Gek-doj, perfektaj esperantistoj, povantaj lekcii pri temoj taŭgaj antaŭ intelekta laborista publiko, temoj havantaj ian principan signifon por la evoluo de la individuo aŭ socio (temoj pritraktantaj problemojn de ŝtatekonomio, psikanalizo, seksa demando k. s. ankaŭ literaturaj, pedagogiaj, prilingvaj k similaj temoj).

La dumkongresa kurso, klerigante klasbatalulojn, montru sin kiel efika rimedo en la lukto kontraŭ la daŭre akriĝanta reakcio k por la emancipado de l' proletaro.

Aktivuloj interrilatu kun :

Paul Neergaard (15 326),
Kastelsvej 21,
Kopenhago, Danio.

Por ŝtopi la breĉon.

21. LISTO.

14 173.	(Sauer-Eggenberg)	3.- ŝil. aŭ.
18 018.	A. J. Bienefelt (Delft)	1.50 guld.
15 316.	D. Pons (Mostaganem)	1.- mk. g.
18 333.	H. Cremer (Hildesheim)	-.44 mk. g.
3 691.	J. Duinker (Den Burg)	1.40 guld.
17 484.	C. Delsen (Amsterdamo)	1.- guld.
17 769.	Pam Breeuwsma (Oudendyk)	-.50 guld.
18 155.		5.- guld.
	Kolektlisto de Sat-Rondo (Stuttgart)	10.10 mk. g.
18 374.	k 14 382 (Plzen)	11.25 kr. ĉ.
	Schimp (Bruselo)	9.- bg. fr.
R. p.	(Esperantio)	577.70 fr. fr.
N. N.	(Parizo)	4.- dol.
55.	(Casablanca) por ,,L. N. E"	10.- fr. fr.
	P. Gottgetreu, Hanovero	3.40 mk. g.
17 228.	Chavenon, Clermont-Ferr	5.- fr. fr.

Krome ni ricevis 8 ŝilingojn el Anglio kiel « donacon de iu K-dino por helpi la germanajn K-dojn dum la nunaj perturboj ».

Komuniko de la Direkcio.

Pro la konataj cirkonstancoj en Germanio ni devis decidi forkonduki la administracion el tiu lando; bonvolu noti en la memoron la adreson por administraciaj aferoj, kiu estas tiu de la Sidejo de SAT : *23, rue Boyer, Paris 20.* Estas cetere la sama motivo, kiu decidigis nin ŝanĝi la presejon; kun sincera bedaŭro cetere, ĉar nia presisto en Gelnhaŭzen laboris plene kontentige por ni. Ni jam nun atentigas la membraron, ke baldaŭ ekfunkcios *novaj* poŝtĉekaj kontoj *je la nomo de nia Asocio* en diversaj landoj; tuj post instalo ni konigos ilin en « S-ulo ». Dume oni daŭrigu uzi por pagoj la ĝisnunajn poŝtĉekajn kontojn.

Nesufiĉaj ĝis nun estas la *antaŭmendoj* por la special-numero de « Sennacieca Revuo » okaze de la *Unua de Majo*. Bonvolu prikonsideri la aferon en ĉiuj grupoj k fari viajn *mendojn kun pago*[1]) nepre ĝis la 3. majo plej malfrue al la Administracio. Tiu n-ro estos aparte belaspekta k kun elektita, tre leginda enhavo[1].

Ni sukcesis lastatempe eldoni kelkajn broŝurojn, dank' al la financa helpo de K-doj aŭ societoj. *La Liberecana Socio* aperis dank' al la prunta disponigo de monsumo kolektita en anarkistaj rondoj; *Gvidilo tra la Esperanto-Movado* estas finance certigita de la Nederlanda L.E.A.; *Fremdvortoj en Esperanto* aperis ankaŭ nur per antaŭmendoj k parte kun la helpo de la Libroservo de la Nederlanda L.E.A.

Se ne aperadas pli multaj verkoj ĉe la eldonkooperativo de SAT, la kaŭzo por tio *ne* estas en la manko de bonaj k taŭgaj manuskriptoj : pluraj verkoj estas tute pretaj laŭ teknika vidpunkto, por esti eldonataj, k nur atendas pli prosperan staton de nia kaso, por iri en la presejon.

Ni memorigas, ke SAT posedas sufiĉe grandan dormantan kapitalon en libroj; estas sekve la tasko de ĉiu SAT-ano helpi en la cirkulado de tiu kapitalo per aĉeto de tiuj libroj k per reklamado por ili en la grupoj. Neniu forgesu, ke esp-o vivas ĉefe per sia literaturo; ni sekve ĉiel klopodu, por ke la proletendenca literaturo estu prospera. Ni faris nian devon; faru la vian....

DEZIRESPRIMO

La Amsterdama SAT-Rondo, en sia kunveno de 11. marto 1933, larĝe pripalolinte la elekton de nova Plenum-Komitato, konstatinte, ke la SAT-interesojn plej bone plenumis la nuna Plenum-Komitato k konkludinte, ke sub la nunaj por la laboristaro pezegaj cirkonstancoj Parizo estas la plej taŭga sidejo por nia Asocio, deziresprimas : ke la nuna Plenum-Komitato denove kandidatigu Parizon kiel sidejon de la P.K., eĉ se ĝi ne povos persvadi K-don Lanti akcepti rekandidatigon.

Por la Amsterdama SAT-Rondo :
H. Bishoff (15 408) loka perantino,
J. W. Minke (14 942) landa peranto.

La Pariza SAT-rondo en kunveno de la 3. aprilo decidis respondi, ke post eksiĝo de la nuna P. K. ne troviĝas aliaj Gek-doj en la Rondo por plenumi la P. K.-an taskon; ke sekve preferinde Amsterdamo (aŭ alia vigla SAT-rondo) prenus sur sin la gvidadon.

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

Mondorganizo aŭ Internacio?

Sub tiu ĉi titolo troviĝas en n-ro 7 de « Laborista Esperantisto » (Nederlando) interesa (nacilingva) artikolo de A.V. pri la organiza problemo. En ĝi estas prezentataj la motivoj, pro kiuj la organiza strukturo de SAT estas la plej taŭga por la unulingva laborista esperantistaro, k pro kio estus sensence, se ni organiziĝus laŭ la modelo de la jam ekzistantaj lab. internacioj.

La korekta prononcado k stilo

de esperanto estas pritraktita de K-do Skot (Scott) en la « Bulteno de SAT en Britio » (n-ro 5), kiu estas gratulinda pro tiu elpaŝo. Oni ja ne sufiĉe povas insisti pri klara prononcado, k ĉiu K-do, kiu jam partoprenis SAT-kongreson, povas konfirmi, ke por anglalingvanoj estas tre malfacile akiri la korektan k klaran elparolon.

En la japana revuo « Verda Mondo » (febr.), aperanta ĉe la sidejo de la Oomoto-sekto, la eŭropano J. Major avertas instrue la legantojn pri japanismoj, kiujn li spertis en la esp. uzado de l' japanaj esp-istoj.

Esperanto estas nenies propraĵo.

En fruntartikolo de la aprila n-ro de « Germana Esperantisto » la estraro de la Germ. Esp.-Asocio faras deklaron pri la celo de sia ekzisto. Ĝi diras, ke la asocio celas nuran propagandon de esp-o sen interligo kun iu ideo, k sen okupo pri politikaj, rasaj k religiaj celoj. « Esp-o ne apartenas al iu popolo... krei egalrajtecon por ĉiuj sur lingva kampo, tio estas la senco de l' esp-a movado.... » Enkonduke oni trovas citon de Hitler, rilatan al la interkompreniĝo de l' popoloj... sub la kondiĉo de egalrajteco por la germana popolo.

Ĉu terkulturistoj bezonas esperanton?

Tiun demandon esploras F. Novljan (K-do?) en « La Suda Stelo » (Slavonski Brod, marto). Li konstatas : « La laboristoj estas internaciuloj : la laboro gvidas ilin tra la mondo, kie ili ankaŭ ellernas fremdajn lingvojn.... La vilaĝano per sia laboro estas ligita al sia tero k al sia hejmo, li estas naciulo. Lerni fremdajn lingvojn li ne havas okazon.... » Tamen F.N. opinias, ke bezono de esp-o por la vilaĝanoj ekzistas, ĉar « estas nepre necese, ke iliaj delegitoj el diversaj landoj kunvenu k pridiskutu komunajn interesojn de la agraraj landoj ». Ĝojiga konstato ĉe la fino : proks. 500 vilaĝanoj en Jugoslavio lernis esp-on. Sed oni povas sin demandi, ĉu pro praktikaj celoj aŭ nur pro la ideo....

Pri instruado de esperanto al infanoj

jenaj konsiloj de instruisto (A. Neuz) en la marta n-ro de « Ligilo » : « ... Se ni volas sukcesplene labori, ni devas jungi en la laboron ĉiujn kvin sensojn, ĉiujn instinktojn, kiel ludemon, moviĝemon, imitemon, kreemon, vetbatalemon, kuraĝon, sopiron pri propra laboro, scivolemon, korpajn fortojn de ĉiuj partoj de la korpo, infanan, naturan bonhumoron.... Ĉiam ni montru al niaj lernantoj la praktikan celon de nia laboro[1]. »

« *Post dolĉa vino restas acida vinagro.* »

CK de SEU ne sendas interŝanĝe siajn presaĵojn; sed niaj tieaj amikoj de tempo al tempo havigas al ni ekz-on, en kiu troviĝas io karakteriza. Do trafis nin lastatempe la n-ro 5 de « Bulteno ». Ĝi estas okpaĝa k redaktita tute en esp-o — kio estas sendube eksterordinaraĵo, ĉar kutime ĝi estas grandparte en rusa lingvo. La ĉefartikolo estas vigla alvoko por disciplino al la SEU-anoj k vipado al malbonaj kutimoj, pri kiuj ĝis nun oni kutimis kulpigi la kapitalisman sistemon.

En artikolo kun titolo « korespondkursoj de esp-o » interesa estas jeno : « Ni anoncis en « Izvestia » pri ĉio, kio estas necesa por tuj aliĝi al kursoj. La afero plisimpliĝis : « Sendu sciigon pri vi mem, la certigilon pri via salajro k trionon de la pago laŭ tarifo k vi tuj ricevos lernmaterialon. » La rezulto de tiu anonco estis, ke dum unu monato enskribiĝis 200 novuloj. Sed la ĵurnalanoncoj kostas multe... », rimarkigas la aŭtoro k alvokas la K-dojn, ke ili varbu en siaj respektivaj medioj.

Sed la plej karakteriza skribaĵo en tiu n-ro estas pli ol unupaĝe ampleksa artikolo, en kiu K-do Lanti estas superŝutata per amasego da plej krudaj insultoj. Jen kelkaj : « Malfacila estas la pozicio de Lanti. Plenumante sian lakean servon al kapitalismo, li devas venenigi la mensojn de laboristoj, enporti al ili putraĵon por malaktivigi ilin en batalo kontraŭ kapitalismo k frakasi unuecon inter proletoj diverslandaj.... » Tiel komenciĝas la artikolo k iom pli poste ni legas : « Kaj Lanti plenumas mendon de siaj mastroj, metante sian gazeton al senpera servo por kapitalismo. » Farante nenian komenton ni nur citu ankoraŭ la konkludon, por ke la legantoj povu prijuĝi la insultokapablon de G. D., la subskribinto de tiu kotaĵo : « Ĉiu nova

[1] *Prezaro por la maja speciala-ro* : 1 ekz-o : 1.80 fr. fr., 5 ekz-oj 6.- fr., 10 ekz-oj 10.50 fr., 20 ekz-oj 19.50 fr., ĉiu plia deko 9.- fr.

[1] Ĉi tiu konsilo validas ankaŭ por plenaĝaj lernantoj. — *N. B.*

artifiko de Lanti nur pruvas, ke li evidente serioze k porlonge vendis sin al la burĝaro ».

(Daŭrigota.)

AL PILORIO

En la aprila n-ro de « La Socialisto » estas skismiga artikolo de F. Chamarre, eks-SAT-ano el La Rochelle (Francio). Ni ne intencas polemiki kun tiu persono, sed opinias, ke necesas almenaŭ konigi al la interesiĝantoj, kia estas la morala valoro de tiu severe kontraŭbolŝevika « socialisto ». Antaŭ kelkaj jaroj li priploris al la « bolŝeviko » Lanti por fariĝi redaktoro de « S-ulo »; li tradukis francen la verkon de la bolŝeviko Izgur : « Je la nomo de l' Vivo », k lastatempe li pretekstis, ke la bolŝevikoj faris skismon en F. E. O. por ne pagi sian ŝuldon al tiu organizo k eĉ respondis al ties estraro per sarkasme senhonta letero. Tiuj faktoj plifaciligas komprenon pri skismigaj klopodoj sub socialista masko....

ĈE LA LABORISTAJ ESPERANTO-ASOCIOJ

Likvido de la Socialista Esperanto-Asocio (SEA).

La estraro de S.E.A. decidis *a*) prokrasti la asocian kongreson en Dresdeno ĝis pli oportuna tempo; *b*) likvidi la Socialistan Esperanto-Asocion ĝis la 31. marto 1933; *c*) inviti la membraron aliĝi ekde la 1. aprilo al « Societo de Esperanto-Amikoj » por la germanlingva regiono (SEA), kiu estas politike tute neŭtrala unuiĝo. « La Socialisto » ne plu estas liverata kiel asocia organo; anstataŭe aperos depost majo « La Esperanto-Amiko » en propra eldonejo. La infangazeto « Amikecon » ne plu povas aperi.

PROTESTO

La ĉi-suba *protesto* estis sendita je la 15. febr. al la redakcio de « La Socialisto » kun peto pri aperigo en la marta n-ro de tiu gazeto, kiu tiutempe ankoraŭ estis la organo de S. E. A. Tial ke nek en la marta, nek en la aprila n-ro de « La S. » ĝi aperis, ni publikigas ĝin en ĉi tiu loko. *Red.*

En la n-ro 2 de « La Socialisto », paĝo 8, sub la titolo : « El la gazetaro » oni legas jenan finfrazon : « Kiel oni cetere juĝas pri la lernolibro eldonita de SEA? »

La estraro de SEA protestas kontraŭ tia skrib- k batalmaniero, kiu kapablas veki ĉe la legantoj de « La Socialisto » la opinion, ke ankaŭ SEA agus kontraŭ la konvencio de Göteborg k estus malfidela al SAT. La lernolibro eldonita de SEA enhavas germanlingvan tekston je la fino, do ĝi neniel kontraŭas la konvencion inter la LEA-oj k SAT. Krom tio oni ne komparu nian lernolibron, kiu ja estas verkita por komencantoj kun la « Lego-kajero de ALLE », kiu estas por K-doj, kiuj jam lernis nian lingvon.

La SEA-estraro :
L. Puff.

Kial k kiel mi fariĝis esperantisto k SAT-ano.

Estis la lasta mondmilita jaro. La laboristaro de Finlando, kiu longe batalis kontraŭ malsato, fine ribelis k post trimonata interna milito estis subpremegata de la burĝa klaso. Preskaŭ cent mil gelaboristoj poste suferis en malliberejoj. Pli ol dekono el ili malsatmortis aŭ estis mortpafata. La resto estis kondamnata al punlaboro de du ĝis dek kvin jaroj, dumvive aŭ por suferi ekzekuton. Ankaŭ min oni honoris per dumviva kondamno.

Post terurega esploraresto oni min enŝipigis k transportis al fina punejo, por konatiĝi kun la nova vivkariero. Tamen okazis malhelpo en la komenco. Mi emis legi k skribadi k laŭ eblo uzadis tiujn tempopasigilojn. Sed nesciante la morojn de tiu instituto, mi skribis leteron por mia familio k nur poste eksciis, ke estas malpermesite sendi leterojn laŭ ĝistiama maniero. La skribaĵo do restis en mia poŝo k spiono, lokita en komuna ejo, raportis al la estro de l' punejo, ke mi estis skribinta ion. Sekve de tio mi estis enkarcerigata por tri monatoj, kun naŭtaga malsatpuno kiel komenco. Tiel do eĉ legado estis al mi neebligita por kvaronjaro.

Forpasis la unua jaro malliberula, la plej terura en mia vivo. Dume finiĝis la tutmonda hombuĉado k renversiĝis la dorsapogo de la hejmaj tiranoj. Ne surtroniĝis la unua reĝo, elektita por Finlando. Ankaŭ la ebristato de l'venko elvaporiĝis el la kapoj de la venkintoj. *Libero* estis la signalvorto de la amikoj de politikaj malliberuloj. Denove oni sendis okdek deputitojn socialistajn en la parlamenton, kiel estis antaŭe. Entute estas ducent deputitoj. Sekvis amnestio, dua, tria. La kaptitoj, kondamnitaj eĉ por dek jaroj, estis liberigataj. Ankaŭ oni klopodis mallongigi la verdiktojn. Tiel okazis ankaŭ pri mia afero. Unu tagon mi estis kondukata al la estro de l' punejo k tiu laŭtlegis al mi informon, ke la plej alta tribunalo kontrolis la kondamnon de N. N. k ektrovis justa malaltigi la dumvivan punon ĝis dek jaroj.

Venontan fojon, kiam mi havis la favoron por viziti librejon, mi trovis esperantan lernolibron k poste ekstudis ĝin. Kun kreskanta entuziasmo mi enprofundiĝis la geniaĵon de Zamenhof k post du semajnoj, kiam estis tempo redoni la libron, mi tre bedaŭris, ke mi devis ĝin ellasi. Sed la instruisto, kiu min demandis pri la signifo de kelkaj vortoj, eble almetis nulon en mia meritaro, ĉar mi nenion sciis pri la vortoj. Mi ja ĉefe enkapigis nur gramatikon, k tio bone helpis pluan studadon post la liberiĝo.

Kial mi ne antaŭe aliĝis al SAT? Nu, tion malhelpis la antipatio, kaŭzita de politiko, kiun ĉi tie uzadis friponoj en la nomo de iu ismo. Pro tio mi atendis, ke enaeriĝu la fanatiko el « S-ulo[1] » k tio okazis dank' al la malĝentila trudemo de senbriduloj[2]. Mi aliĝis k la kvarcenta numero de « S-ulo » alportis al mi la saluton de supernaciaj Gek-doj. Mi sendas la plej sinceran saluton al SAT-aliĝintaj Gek-doj k admonas ekstere restintajn sekvi ilian ekzemplon, ĉar esperanto ja plene meritas la atenton de laboristaro, kiu estas destinita ĉesigi la nunan maljustaĵon, laŭleĝan rabadon.

Aktiva 18288.

[1] *Sennaciulo.*

[2] Koncernas la skismulojn de la SAT-movado. — *Red.*

Pri ferivizitoj.

Fidela al mia propono en « S-ulo », fine de la pasinta jaro, mi raportu ĉi-loke pri la sukceso de mia alvoko pasigi feritagojn en *Bottrop* (Germ.). Pasis nur unu semajno post publikigo de mia alvoko, kiam K-do anoncis sin. Leterinterŝanĝo rezultigis venon de plia K-do. Restonte dum unu semajno, en komenco de junio, en la Rur(Ruhr)-regiono, ili havos certe okazon konatiĝi tiel kun la lokaj Gek-doj kiel kun la laborista vivo de la regiono. Tiucele okazigota interurba renkontiĝo espereble venigos are verdstelanojn al nia urbo. Nialokaj K-doj promesas kiel eble plej agrabligi tiujn tagojn al la nederl. K-doj, k ili jam nun senpacience atendadas ilian alvenon. Hejmenvenonte niaj gastigotoj rakontu en « S-ulo » pri siaj spertoj.

En julio min k alian K-don volas gastigi Gotenburgaj K-doj; ĉu efektiviĝos? En aŭgusto mi deziregas viziton de K-do el Francio aŭ Belgio.

15026.

***

Kiel finon al nedezirinda k miskomprenojn elvokinta debato inter du nederlandaj K-doj pri supra temo (vd. n-rojn 392, 397 k 399) ni ricevis ankoraŭ skribaĵeton de K-do 15 547, en kiu ĉi tiu K-do diras, ke lia artikolo ne estis direktita kontraŭ persono, sed estis pure priafera. Li rekomendas la modelan labormanieron tiurilatan de K-do 15 026 k bedaŭras, ke K-do Wiersma sin ne defendis en la gazeto, kiel proponis la redakcio, kontraŭ la riproĉoj, se ili estus nejustaj.

EN NIA MOVADO

KRONIKO

ĈEĤOSLOVAKIO. *Plzen.* En la grupo Kulturo paroladis K-do Brauer el Bratislava pri nia movado en Svedio, pri kiu li tre favore esprimiĝis. Li gvidis tie esp. kursojn. *Aussig.* Okaze de *internacia laborista sportfesto* en nia urbo (la 5. aŭgusto 1933) kun grandaj manifestacioj ktp. ankaŭ la estraro de Ĉeĥ. LEA (soc. dem.) decidis aranĝi bonefikan propagandon. Ni intencas instali lumreklamon proksime de l' sporta stadio. Ni akceptas propagandaĵojn, k se la K-doj povas sendi, ankaŭ iom da mono sub devizo « Laborista festo Aŭssig ». Adr. K-do Ed. Paŭl, Langegasse 38, *Aussig E.* Pri sportaferoj oni sin turnu al « Arb. Turn-u. Sportverbd., Bahnhofspl. 1, *Aussig* (*F. Tiŝer*) ».

Havigu al vi,
se vi ne jam estas abonanto,

SENNACIECA REVUO N-RO 2

El la enhavo : La revolucia mistiko. — Plimultiĝas la vokoj kontraŭ la milito. — Hindiaj problemoj. — Fibra industrio en Japanio. — Nia malvenko en Germanio. — Literaturo el Sovetio. — Marksismo, ktp. ktp.

La unuopa kajero kostas 2.50 fr. fr.
16 paĝoj. — Ilustrita.

Mendu ĉe Administrejo de SAT,
23, rue Boyer, Paris (XX^e)

JAPANIO. *Saijo* (Nagano). Kurso por 74 gelaboristoj de silkfabriko dum 3 vesperoj semajne; en najbara urbeto Dacuŝiro simila kurso por 65 gelaboristoj.

SVEDIO. *Arvika*. 24 novaj klubanoj. Esperantaj deklamoj en festkunsido de 19.2. *Bollebygd*. Jarkunveno (1.2.). 5 kursoj kun sume 40 p. *Boras*. Unua konferenco de l' Gotenburga LEA-distrikto (12.2.). Reprezentitaj estis 6 kluboj, kiuj elektis estraron en Gotenburgo. Teatra grupo prezentis duaktan originalan teatraĵon de K-do V. Ekström, Ĉ. 50 ĉeestantoj. *Boxholm*. ABF-kurso laŭ iniciato de l' metalista sindikato kun 60 l. Rektmetoda instruo de K-dino Gyllsdorf. *Forshaga* (Vermlando). Nova klubo fondita kun helpo de ABF; 19 anoj. *Gustavsberg*. Okazis « holanda vespero » (18.2.) kun parolado k muzikado de K-do Aarse. *Gällivare*. Komenca k daŭriga kursoj, helpe de ABF. *Gotenburgo*. Daŭriga kurso por senlaboruloj (gvidas K-do Lindqvist). K-do E. Ekström gvidas kurson por komenc. (20 p.), por daŭrigantoj (30 p.). Pluraj novaj kursoj ĉe ABF-klubo. *Höganäs*. Itala K-do lekciis la 18.2. ĉi tie, en *Landskrona* la 8.2. (kie ĉeestis 300 p.). *Lidingön*. 2 studrondoj. *Malmberget*. Jarkunveno kun festeto bonsukcesa la 11.2. *Malmö*. K-do Neergaard (Kopenh.) lekciis la 25.2. pri la strukturo de esp-o. *Skoghall*. Sukcesa infankurso de K-do Glöckner. Du plenaĝulaj kursoj kun 80 p., el kiuj multaj jam aliĝis al la klubo. *Stokholmo*. La anarkista grupo havis letervesperon (25.2.) kun 57 leteroj k poŝtk. ricevitaj el 18 landoj k festeto. — En la *Stokholma distrikto* lernas nun ĉ. 750 p. en 50 studrondoj kiujn gvidas 20 Stokh. k 2 eksterlandaj instruantoj. Ne malpli ol 150 tramistoj nun studas la lingvon en Stokh., krom la tramistidoj, kiuj kolektiĝis en 2 rondoj kun 50 l. La kanthoro « La kantobirdaro » aranĝis feston (4.3.), kiun ĉeestis 220 Gek-doj kun konatuloj. *Svalöv*. Itala K-do parolis plurloke en ĉi tiu regiono antaŭ ĉ. 300 p. — 76 p. en la kursoj de l' klubo. *Töreboda*. Kurso kun 20 p. Krome lernas 40 infanoj el 3 popollernejaj klasoj (instruanto : Ŝuldenfraj). *Varberg*. Kurso kun 75 p. En kurso por progresintoj studas 15 l. (Laŭ « Sveda Lab. Esp. »).

Ekster nia movado.

La *itala* ministerio de publika instruado sciigis en sept. 1932 al la prezidanto de l' Itala Esp Federacio, ke libervolaj kursoj de esp-o estas ĉiam permesataj ĉe ĉiuj italaj lernejoj.

Esperanta rubriko (10 paĝoj el 60 en esp-o) estas malfermita en *japana* monata revuo por infankulturo, kiu celas interligon internacian de infanoj. Esp-o estas akceptita por korespondado (Adr. : Teikoku Ĵidoo-Kioikukai 20, Niŝi-Gohenĉoo, Uŝijome-ku, *Tokio*, Japanio).

Erjo (Herriot), eks-ĉefministro de Francio, laŭdis refoje la valoron de esp-o por la repaciĝo de l' popoloj okaze de vizito de fraŭlino Zamenhof kiel esp. instruantino en *Ljono* (Lyon).

ĈEĤLINGVANOJ!

« La Laborista Esperantismo » de K-do E. LANTI ĵus aperis en ĉeĥa lingvo!

Jam ekzistis angla, germana, nederlanda k sveda eldonoj de tiu populariĝinta broŝuro, kiu estas bonega propagandilo, ĉar ĝi pravigas k fundamentigas nian movadon.

Mendu do senprokraste k grandkvante la ĉeĥlingvan eldonon ĉe :

Laborista Ligo Esperantista, *Prago VII*, Domovina, aŭ ĉe K-do Pelcman, *Plžen*, Sladkovského 29. — Prezo 2.50 kč, per poŝto 3 kr. Oni povas pagi per ĉeĥoslov. poŝtm. en letero.

Presita vorto estas armilo.
Varbu por via gazeto!

La *katolikaj* esperantistoj registras la aliĝon de episkopo en Ĉeĥoslovakio al ilia movado.

Japana eksministro k konata parlamentano Jukio Ozaki esprimis sin en gazetartikolo tre favore por esp-o; lia filo estas fervora esp-isto.

La urbestraro de *Roterdamo* (Nederlando) subvencias per granda sumo (pli ol 70 mil guld.) la deĝi instalitajn kursojn por senlaboruloj, inter kiuj ankaŭ troviĝas esp. kursoj, kiuj (sekve) partoprenas en la subvenciado.

En *Novzelando* (Mastertono) okazis findecembre 1932 la 4-a tiulanda esp. kongreso, en kiu estis akceptata peticio al la registraro pri oficiala instruo de esp-o en la publikaj lernejoj.

De la 21. junio ĝis la 1. julio okazos en la Esperanto-Domo en *Arnhem* (Nederl.) internacia kurso por la geoficistaro de poŝto, telegrafo k telefono.

En Holiŭd (Hollywood), Usono, oni preparas *esp-an filmon*, kies ĉefan virinan rolon havas la aktorino Marion Marŝ (Marsh), kiu lernis la lingvon dum kelkaj monatoj.

La Nacia Patronaro por Turismo decidis doni al *Hispana* Esp-Asocio 2 500 pesetojn por esp. laboro al turismo. Ĝi eldonos ilustritajn priskribojn en esp-o. Adr. : Patronato Nacional del Turismo, str. Medicaneli 2, *Madrid*.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

La Suda stelo. Organo de la Esp.-movado en Jugoslavio. Adr. *Slavonsky Brod*, poŝtfako 44. — Poŝtĉeko Zagreb 37 556. Abono (enlande) 48 din., (eksterl.) 1 us. dolaro. Form. 20 × 28 cm. — 18 pĝ. Jan. 1933.

Tiu nova gazeto, kun kolora kovrilo, estas redaktita tute en esp-o k enhavas detalan kronikon pri la movado en Jugoslavio, parte ankaŭ laborista, k artikolojn pri historio k ekonomio de tiu lando.

Tutmondo Esperanta. N-oj 1 k 2 (jan., feb.). Adr. : *Karlsruhe*, Dammerstockstr. 15, Fr. Schloe. Kvaronjare : 0.40 mk. g. Form. 16 × 24. Amuza k sciiga. 12 p.

Laŭ la klarigo de l' redakcio la eldonaĵo havas proksimume la saman taskon kiel « La Lernanto » aŭ « La Praktiko »; do la red. rimarko, ke « mankas tiaspeca gazeto », estas neĝusta. La proverbeca esperantista gazetfonda manio ankoraŭ praviĝas....

La Regno de la Homo. *Organo de renovigo homa k socia.* Gvidanto : Henry Liberge, 12, rue de la Fontaine, *Bièvres* (S. O.) Francio. Abonpr. 6 fr. (en Francio 5 fr.) por 4 n-roj jare, 30 p. Form. 15 × 20 cm.

La prezentata n-ro (vintro 1932) estas parte esperanta, parte franca. La enhavo : kontraŭdogma, kontraŭmilita, por socialismo k kontraŭ la burĝaj antaŭjuĝoj (pri nudismo ekz). La presmaniero tre primitiva; la esp-a teksto parte sen supersignoj (almenaŭ en la unuaj paĝoj). La lingvo ne tute senerara.

Ĉu vi jam legis :

P. Neergaard

FREMDVORTOJ EN ESPERANTO

Ĉi tiu lingva studo estas bonvena helpo al ĉiu serioza esperantisto.

64 paĝoj. — Prezo : 1 svisa fk. (5 fr. fr.).

Oni pagas por tiu libro ne al la aŭtoro, sed nur al :

Administrejo de SAT, 23, rue Boyer, Paris XX.

MEMORNOTO

Represis el « S-ulo » : *L'Unité*, Paris, 18.3. (Proletoj el la mondo, 400).

Priesper. artik. k notojn enhavis : *Signalen*, Stokh. 9., 16., 23., 30. 3., 6. 4.; *De Fakkel*, Amsterd., 16., 28. 3., 5. 4.

Pri la SAT-Kongr. raportis : *Arbetaren*, Stokh., 31. 3., 5. 4.

NIA POŜTO

11 082 k. a. — Ĝis instalo de la *novaj* poŝtĉekaj kontoj vi povas, pagante al la ĝisnunaj, indiki kiel vi faris ĝis nun, la celon de l' pago *dorse* de l' ĝirilo (por eviti duoblan poŝtelspezon). Okazos nur prokrasto de kelkaj tagoj per la transsendo el Lajpcig.

Grodnano. — Ni faras nian eblon por eviti neologismojn; « pelotono » ne troviĝas en « Pl.V. »; en franca vortaro de G.-M. la trad. estas « duonroto ». Enkonduko de « pelotono » tamen estas pridiskutinda.

13 606. — Ni ricevis malmultajn rap. el G., k neniu K-do parolas sufiĉe libere k malkaŝe. Tamen ni preparas ampleksan artikolon pri Germ. por la maja « SR. ».

Esperanto-Klubo de Lysekil

arangos letervesperon la 7-an de majo Sendu PK k L multnombre! Respondo garantiata. Adreso : Sven Utberg, Dalskogen. *Lysekil* (Svedio).

Alvoko al ĉiuj bonpensuloj.

La subskribinto iniciatas helpagadon por la germana infanaro endanĝerigita per la nuna reĝimo en Germanio. Ĉi tiu agado estu farata libere de ĉiu politika pasio. Oni vidu nur la interesojn de la infano k nepre nenion alian. Tiucele estu starigotaj komitatoj, zorgontaj pri la protekto al germ. infanoj. Ĉiu simpatianta kun tiuj pensoj sendu nomon k adreson al S-ro *I. Keesing*, Grensstraat 12, *Amsterdam-O*, kiu klopodos pri plua disvolvo de la afero.

Resume laŭ gazetarservo de Ned. Fed. de Lab. Esp-istoj.

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 5 fr. fr., ĉiu plia linio 3 fr. fr. — Grandaj anoncoj kun kadro : po kv. cm. kostas 1.20 fr.

POLIO

Fitatelistoj! Ĉiu, kiu dez. interŝ. PM el tuta mondo, devas aliĝi al Filatela Klubo. Honesta k ĝustatempa interŝ. certigata. Postulu prosp. laŭ adr. : *Wladysl. Lekowski*, Skrynka poczt. 10, *Warszawa-Zoliborz*.

SVEDIO

Du tipografistoj k ferlaboristo dez.kor.kun eksterl. Gek-doj. Tipografo *Gösta Holmkvist*, Tegelgårdsgatan 8; tipog. *Stig Lidman*, Stora Nygatan 65; ferlab. *Otto Ohlsson*, Tegelgårdsgatan 8, *Malmö*.

RADIO-PROGRAMO

26.4. : Leningrad (857 m), informoj (same 29.4.).
29.4. : Zagreb (307,1 m), parolado.

BRODARD ET TAUPIN, Coulommiers-Paris.